# T.J.O. BULTENO

Monata eldono de Tutmonda Junular-Organizo,Belga Sekcio.

Ĉefperanto : C.Braet,Esseboomstraat,1,Brugge.(Ĝiro: 4770.86)
Propagandcentro: G.Maertens,Nieuwstraat,54,Assebroek.(Ĝ: 2914.29)
Korespondcentro: Ph.Cullus,3 Grand'Place,Braine-le-Chateau.

## JUNULARKUNVENO EN BLANKENBERGE ( 1,2,3,4 & 5 aŭgusto)
Lastaj sciigoj ....

Alveno : La eksterlandanoj alvenu la Ian de aŭgusto,posttagmeze kaj vespere.La belgaj membroj nepre kaj plejlaste alvenu la 2an,antaŭtagmeze.Se ili ŝatas,ili ankaŭ povas jam alveni la Ian.
Alvenante en Blankenberge,ĉiuj sin prezentas unue en la akceptejo de la kunveno: Rijksnormaalschool,Jeugdherberg.(200 metroj de la stacidomo.)

Foriro : La fino de la kunveno kaj la foriro de la partoprenantoj estas la 5an de aŭgusto.Supozeble,la eksterlandanoj kiuj ne pli longe restas en Belgujo,foriros matene.La aliaj partoprenantoj foriros posttagmeze.

Aliĝilo : Ĉiu partoprenanto mendu aliĝilon.
La belgoj mendu ĉe la ĉefperanto.
La alilandanoj mendu ĉe iliaj ĉefperant(in)oj,aŭ rekte al Carlos Braet.
Ĉiu partoprenanto plenigu sian aliĝilon,kaj resendu ĝin tuj al C.Braet,Esseboomstr.,1,Brugge.

Kostoj : Ĉiu partoprenanto almenaŭ devas pagi kongreskotizon de 55 bfr.(post la 15an de julio : 60 bfr.)
En la kongreskotizo estas enkalkulitaj : loĝado,ekskurso al Brugge kaj ĝeneralaj kostoj.

Manĝado : Ĉiu partoprenanto povas aĉeti en la akceptejo (manĝoservo) manĝaĵpaketojn po 15 aŭ 17 bfr.(bulkoj,ŝinko,ovo) Tiuj paketoj estas akireblaj matene,tagmeze kaj vespere.Matene oni ricevas kafon kun lakton.Kelkfoje tagmeze oni ricevos supon varman.
Tiuj kiuj volas varman tagmanĝon,povas ricevi tian en ĉiu restoracio en Blankenberge,po 60 a 80 bfr.
Ĉiu kunportu tranĉilon,kuleron,pokalon kaj teleron.

Pago : La partoprenantoj pagu la kongreskotizon al Carlos Braet (Ĝiro:4770.86)
La holandanoj pagu al M.v;d;Horst,TJO-kasisto.
La manĝaĵpaketoj povas esti pagataj en Blankenberge.Sed estas dezirinde ke vi ankaŭ pagu ilin kun via kotizo.

Loĝado : La partoprenantoj dormos grandparte en junulargastejo kaj tendojn.Ĉiu devas kunporti : pajlosakon,dormosakon,litkovrilon kaj tualetilaron.Ankaŭ ne forgesu vian banveston,ĉar oni povos naĝi !

GEAMIKOJ ! JAM PAGU NUN VIAN JARKOTIZON POR LA NOVA ADMINISTRATIVA JARO (julio 1946-junio 1947) - DANKON !

Kelkaj punktoj el la Blankenberga programo . . . . !

Ĵaŭdo, 1 aŭgusto.

Vespere, S-ano Joŝjo Verstrael (Holandano) parolos pri :" La granda utilô de korespondado."

Vendrede, 2 aŭgusto.

Posttagmeza kunveno: "Ĉu la junularorganizoj esperantistaj kaj neesperantistaj povas influi unu la alian ?"- Parolas : S-ano Philippe Cullus.(Belgo)
Vespere: Malformparoladoj de Carlos Braet kaj F-ino Mary Krijt, deligitino de la TJO-estraro.
La filmo pri Tervuren.

Sabato, 3 aŭgusto.

Antaŭtagmeze: Laborkunsido de la Belga Sekcio de T.J.O.
Posttagmeze: Al la marbordo !
Vespere: La filmo pri Groet.
S-ano Des Roose (belgo) parolas pri: "Esperanto kaj la moderna tempo."
Karl Erik Karlsson (svedo) parlas pri sia lando.

Dimanĉo, 4 aŭgusto.

Antaŭtagmeze: Laborkunsido de T.J.O.(estraro)
Posttagmeze: Ekskurso al Brugge, la "Venecio de l'Nordo". Boatveturado sur la bruĝaj kanaletoj. Vizitado de la urbo sub gvidado de S-ano Roose.
Vespere: Festvespero. La belgaj junulargrupoj reprezentas kantnumerojn, muziknumerojn, ŝordancojn, ktp.

Lundo, 5 aŭgusto : Foriro .

- Ni ne povas jam komuniki la tutan kompletan programon. Tamen ĉiu partoprenanto ricevos ĝin presitan, je sia alveno en Blankenberge.

oooooooooooooooooo

La oficialaj kantoj de la kunveno estos La Espero kaj la T.J.O.-marŝkanto. Tiu lasta estis por la unua fojo kantita en Tervuren !
Necesas ke ĉiuj bone konas tiujn kantojn ! La vortoj de la marŝkanto aperis en la junia numero de La Juna Vivo.
Aliflanke, ĉiuj kiuj povas, kunprenu muzikilon (banjo, mandolino, gitaro) kaj kantaron !

AVONCO !!! "Du anglaj junuloj kun sia instruisto (esperantistoj) intencas bicikli ĉirkaŭ Belgujo post la Blankenberga kunveno, kaj volos renkonti belgajn esperantistojn. Se vi povos renkonti nin, skribu tuj al: F.W. Armitage Winscombe, Somerset, Anglujo."